

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 534

APRILLO 1950

JUS ALVENIS

Majstroverko el Hispanlando

SANGO kaj SABLO

de

Vicente Blasco Ibañez

tradukita de

Ramón de Salas Bonal

Per ĉi tiu romano, pulsanta je vivo, Ibanez tenas spegulon antaŭ la multekolora vivo iberia. La leganto partoprenas en la viglo, la koloro, la pasio kaj ankaŭ la mizero de la hispana popolo, kaj akiras ian komprenon pri ĝia animo.

Verŝajne neniu alia verko permesas tiel intiman bildon, kaj estas tiel detale informa, pri la arango de la taŭrfestoj (bovbataloj), kaj traktas tiom objektivite pri la timoj, luktoj, amoj, ĵaluzoj kaj etaj gloroj de la toreadoroj.

Treege neordinara verko. Streĉe interesa.

Prezo : 9 ŝilingoj, afranko 6 pencoj

Mendu tuj ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencej por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Senpage Instruist(in)oj—pacifist(in)oj ricevos aktualan interesezan informilon "Lernejo por Civilizeco". Aldonu poŝtrespondkuponon (aŭ 2 UL-p-kuponojn). Cerri LpC, C.P.89, Varese, Italujo. Afranku filatele.

Partoprenonto de la 35-a Universala Kongreso en Parizo deziras korespondi kun francaj Esperantistoj. Respondo garantiata. S-ro Ingvar Ekström, Järnvögen, Skutskär, Svedujo.

Kun 18-22 jaraĝaj nordaj katolikaj fraŭlinoj deziras korespondi juna geometro-librotenisto: Antonio Colla, Ricasoli 2, Torino, Italujo.

La Nova Kristanismo, bazita je la doktrino de sveda scienculo kaj reformanto Em. Swedenborg, enportas la certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri la vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Informas: J. B. Vlach, Lužická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakujo.

Filatelistoj atentu! Kiu sendos al mi 2 internaciajn respondkuponojn, tiu ricevos de mi 100 uzitajn Hungarajn poŝtmarkojn. S-ro A. Serfözö, Kisfaludy utca 17, Cegléd III, Hungarujo.

Novaj samideanoj deziras korespondi. Adr: Centre Descartes, Rue Arquaise, Fécamp (S.I.), Francujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, povas ricevi ilin senpage per la Internacia Katolika Informejo. Sekretariejo: Fraterhuis, Loonopzand (N. Br.), Nederlando.

Por efike propagandi Esperanton en nia urbo, ni petas gesamideanojn el ĉiuj landoj sendi al ni bele afrankitajn leterojn kaj poŝtkartojn. Ni ankaŭ deziras korespondi. Adr: Gepoŝtista Esperanto-grupo, Heinola, Finnlando.

Letervespero okazos je la 30.4.1950. Skribu al F-ino Aili Tuominen, Kojo, Kojjärvi, Finnlando.

Farmaciisto Ilkka Kanerva, 26-jara, deziras korespondi tutmonde kun gesamideanoj pri padelado, filatelo kaj aliaj temoj. Respondoj el Danlando kaj aliaj landoj atendataj. Kojjärvi, Finnlando.

44-jara reviziisto interŝanĝos poŝtmarkojn laŭ Zumstein. Tage Gunnarson, Exercisgatan 14, Malmö, Svedujo.

Skribintoj al Tramonda-Esperanto (vidu februaran n-ron de "Esperanto") bv. noti la adreson kompletan: 24 fbg. de Riedisheim, Mulhouse, Francujo.

Filatelistojn seriozajn en ĉiuj landoj serĉas S-ro Vjekoslav Bošnjak, Slav Orahovica, Jugoslavujo.

La germana psikologia studento en Berlin sendinta sian fotografajon ree skribu pro leterperdo, mi petas. M. Otsuka, 4 Kaminosima, Minogo, Nakakawati, Osaka, Japanujo.

24-jara studento deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj: S-ro George Wall, 27 Greenway, Dagenham, Essex, Anglujo.

Kun fotograf-amatoroj de ĉiuj landoj deziras korespondi S-ro Marcello Petrinetto, Via A. Peyron 49, Torino, Italujo.

Lernantoj de Esperanta kurso deziras korespondi kun tutmondaj fraŭlinoj aŭ sinjorinoj. Skribu al la instruisto: P. Castiglioni, Strada Mongreno 197 (Villa Rossi), Torino, Italujo.

Italaj Esperantistoj, 16-20 jaraj, deziras korespondi kun eksterlandaj gesamideanoj. Certa respondo. Skribu: S-ro Grottepaglia, Via Ascoli 9, Torino, Italujo.

Teozofiistoj kaj ĉiu kiu interesiĝas pri tutmonda religio aŭ propagando de Esperanta Tutmonda Biblio skribu al H. Blake, Mon Abri, Chorleywood, Herts., Anglujo.

Letervespero, 10 Majo 1950, speciale por la gelnantoj. Bonvolu sendi viajn poŝtkartojn, leterojn kaj komunikaj-ojn al La Sekretario, Halifax Esperanto-Societo, 45 Horne Street, Pellon Lane, Halifax, Yorkshire, Anglujo.

Vienanino deziras korespondi kun Hinduĵano, Parizano, Usonano pri art-historio, filozofio. F-ino S. Schamanek, Royal Infirmary, Bolton, Lancashire, Anglujo.

Kiu kongresonto franca afable akompanos anglan bicikliston Parizon ekde Dieppe? Parolas Esperante kaj france. Norman Smith, 56 Summer Road, Thames Ditton, Surrey, Anglujo.

Deziras korespondadon k.ĉ.l. kaj interŝanĝi p.k. Josep Hernandez, Provenza 325, Barcelona, Hispanujo.

Antonio Pastor, Ercilla 49, 5, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Nepre respondos.

Pri terkulturo kaj natursciencoj deziras interkorespondi S-ro Angel Torrent Matamala, St. Hilari Sacalm (Gerona), Hispanujo.

S-ro Juan Anglès, Monjas 15, Barcelona, San Andrés, Hispanujo korespondas k.ĉ.l. per l. kaj i.p.k.

"Esperanto". Por kompletigo mi bezonas kelkajn ekzemplerojn de antaŭ mondmilito I kaj multajn de antaŭ mondmilito II. Interŝanĝe kontraŭ aliaj gazetoj aŭ rekomp. per libroj. A. W. Withoos, (nova adreso) Viottastraat 11, Eindhoven, Nederlando.

Plymouth Esperanta Grupo. Al ĉiuj, kiuj sendis poŝtkartojn, broŝurojn, k.t.p. ni sendas dankesprimojn. Nia ekspozicio estis granda sukceso, danke al via helpo.

Muzikamanta junulo deziras korespondi. Giuseppe Donadoni, Corso Lanza 100, Torino, Italujo.

Poŝtmarkojn interŝanĝas kun Usono, Svislando, Danujo, Norvegujo, Germanujo. Katalogo Yvert. Mecenas Salles, Jardim Botaniko 462 apt. 301, Rio de Janeiro, Brazilo.

Grupo Esperantista de Trondheim havos letervesperon komence de majo. Bonvolu skribi al ni. Ni certe respondos al ĉiuj. Adreso: Box 178, Trondheim, Norvegujo.

Ĉu vi vizitos la pasioludojn? Pasigu kelkajn tagojn en la bavara montaro, restu en la belega loko Bad Kohlgrub (14 km. norde de Oberammergau), en verdstela rondo. Detalajn informojn, kontraŭ reafranko, donas: Esperanto-klubo Bad Kohlgrub (Obb.), Haus Edelweiss, Germanujo.

18-jara studento, S-ro Guy Vergne, Tramont, Larodde (Puy de Dôme), Francujo, deziras korespondi kun la tuta mondo.

Notu gravan prezŝanĝon pro la devaluo

Amerika Esperantisto

nun kostas 10ŝil. 6p. por la jaro 1950.

Mendebla ĉe U.E.A.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

43a JARO Aprilo 1950

N-ro 534 (4)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro :
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj
estas permesataj, kondiĉe ke oni
citu la fonton. Por bibliografia
celo oni sendu periodaĵojn en kiu
aperas represo el ESPERANTO,
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12s. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 5 ŝil. : ½ paĝo 50 ŝil.
¼ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.


Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkuponon por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

LA ESPERO

kaj
La Kanto de l'Ligo



Neniu povas senigi de la forta impresoj, kiun kreis, kreas kaj kreas komuna kantado de nia himno *La Espero* (kondiĉe nur, ke oni ne fuŝu ĝin !). Certe estis solena momento, kiam je la unua kongreso en Bulonjo-sur-Marco eksonis tiu ĉi himno, kies sentimentoj estis, por tiel diri, skribitaj el la koro de la kreinto de nia lingvo. La melodion kreis franca Esperantisto, Barono de Ménil. Tiu estas melodio ne ligata al epoko aŭ al ia stilo efemera. La himno estas kaj restos la kanto Esperantista, ligilo inter la komenco de nia movado kaj la nuntempo.

Atente legante la tekston de *La Espero* ni komparas la bonintencajn vortojn de D-ro Zamenhof kun la realo de la tempo, kiun ni trapasis post Bulonjo-sur-Marco (1905). Ni iam kredis, ke komuna lingvo, dua por ĉiuj, facile lernebla de civilizitaj homoj, igos ke la *popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian*. Ni lernis, ke necesas ankoraŭ aliaj faktoroj por certigi la pacon universalan kaj nedivideblan. Estas la iluzioj, kiuj kapabligas idealistojn *elteni* ĝis iliaj ideoj kaj idealoj triumfos ; kaj ni ĉiuj vivas kun tiu ĉi sankta iluzio, medikamento kontraŭ la malico de la homoj kaj de la tempo.

Al la sama kategorio de edifaj kantoj apartenas la *Kanto de l'Ligo* paroloj kaj muziko verkitaj de Mozart. La teksto respegulas la epokon antaŭ la Franca Revolucio, la tempon kiam la problemo de la hom-raĵtoj estis en la tagordo. Pro ĝia altsenta karaktero ĝi fariĝis preferata kanto ĉe internaciuloj. Ĝin tradukis en Esperanton D-ro Zamenhof mem (*Fundamenta Krestomatio* p. 330). Hodiaŭ la *Kanto de l'Ligo* meritas esti ĝeneraligita inter ni. Eble ĝi—kiel tio okazis en Genevo 1925—povus servi kiel eniro ĉe la Malferma Solenaĵo de la Kongreso. Apogas tion la interesa fakto, ke la restariginta Aŭstria Respubliko adoptis la melodion por la paroloj de la nova Nacia Himno Aŭstria. Legu la belajn vortojn de la *Kanto de l'Ligo* :—

*Fratoj manon donu kore,
Kaj senzorge sendolore
Belan horon festu ni !
Ĉion teran forĵetante,
Daŭrus forte kaj konstante
Nia bela harmoni' !*

*Al la Dio kantu gloron :
La spiriton kaj la koron
Kial donis la ĉiel' ?
Serĉi lumon per vereco,
Serĉi virton per justeco
Estu nia sankta cel' !*

*Homoj en la oriento,
Homoj en la okcidento,
En la sud' kaj en la nordo,
Alte teni homan nomon
Kore ami ĉiun homon,
Estu nia liga vort' !*

H.J.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Internaciaj Feriaj Kursoj

De la 17-a ĝis 24-a de julio 1950 okazos en Helsingør, Danlando, Internaciaj Feriaj Kursoj sub aŭspicioj de U.E.A. La kursoj okazos laŭ Kategorioj (1) Dauriga (2) Perfektiga (3) Konversacia. Kursgvidantoj estas: F-inoj M. Noll, I. Christensen kaj S-roj T. Morariu, J. Goeij.

Por ricevi detalojn oni sin turnu al: S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

Kristana konferenco

De 29-a de julio ĝis 5-a de aŭgusto okazos en ĉarma vilaĝeto de la Parizo regiono la tria kristana semajno organizita de Kristana Esperantista Ligo Internacia (K.E.L.I.). La bieno, kie ĝi okazos, estas apud la fama arbaro de Fontainebleau. Okazos, krom kunvenoj, ankaŭ ekskursoj en la rava pejzaĝo ĉirkaŭe. Ĉiujn informojn oni ricevu de la naciaj reprezentantoj de K.E.L.I. aŭ de S-ro Dabezies, av. Debidour 2, Paris 19, Francujo.

Brita kongreso

La 34-a Brita Esperanto-Kongreso okazos en Nottingham je la 26-29 de majo, 1950. La L.K.K. sendas al ĉiuj legantoj de *Esperanto* koran inviton partopreni ĝin. Adreso de la Sekretario: S-ro G. R. Newman, 24 Johnson Road, Lenton, Nottingham, Anglujo, kiu donos ĉiajn detalojn.

Jarkunveno en Islando

Okazis 5-an de januaro la jarkunveno de la Societo Aŭroro en Islando. Oni konstatis aktivan agadon dum la jaro kaj raportis pri vizito de S-ro Russell Scott el Anglujo, kiu restis en Islando dum pluraj semajnoj kaj donis lecionojn. Pluraj Islandanoj intencas partopreni la U.K. en Parizo: Kelkaj jam vizitis Bournemouth.

Tutmonda konkurso uzas Esperanton

La Sendependa Entrepreno de la Kuraĉloko Acqui (*Azienda Autonoma Di Cura Acqui*) en Italujo organizas tutmondan konkurson por kuracistoj. Oni petas originalajn artikolojn traktantajn fiziopatologiojn kaj la terapion de reŭmatismaj kaj artritaj malsanoj. La traktatoj povas esti en Itala, Franca, Hispana, Germana aŭ Angla lingvo. La fakto, ke la entrepreno uzas Esperanton por la reklamado donas esperon, ke venontan fojon tiu lingvo estos inter la oficialaj lingvoj de la efektiva konkurso. Por ricevi detalojn skribu al: Azienda Autonoma Di Cura Acqui (Piemonte), Italujo.

Esperantistoj, libertempu en Norvegujo!

La Esperantista Ferio en Norvegujo okazis jam en 3 sinsekvaj jaroj kaj estis granda sukceso. Proksimume 150 partoprenantoj el deko da landoj ĝis nun ĝuis ĝin kaj ili havas nur laŭdon pri la restado.

Ke la geesperantistoj bonfartas en Lofthus ne estas strange ĉar pli ravan kaj pli idilian lokon por somera restado oni certe ne povus trovi. Oni diras, ke ĝi estas la plej bela loko de okcidenta Norvegujo kaj ĝi donas al la vizitanto ĉion necesan por perfekta kaj harmonia ferio. La eksterlandanoj trovas tie en *nuksoselo* ĉiujn elementojn de la norvega naturo en plena harmonio. Jen la famaj fjordoj, la montoj kun eterna glacio kaj la brilantaj lagoj, kiuj ĉarme okulumas al la vizitanto! Kaj jen en la krutaj valoj vi aŭdas la muĝon de la altaj akvofaloj kaj sovaĝaj riveroj. Vidu la anoncon en ĉi tiu numero, kaj estu bonvena!

Nova aktiveco en Aŭstralio

Sekve de ekloĝo de D. Brkić en Ballarat, Victoria, komenciĝis nova ondo de entuziasmo por nia afero en tiu fora mondparto. Propagando ĉe Rotarianoj, Skoltoj, Y.M.C.A. kaj Y.W.C.A. estas nur parto de la propaganda laboro de nia aktiva samideano. Apartan sukceson oni havis ĉe radio-amatoroj. Por la unua fojo en Aŭstralio Esperantistoj babilas unu kun alia per la mallongaj ondoj de radio. Tio estas sekvo de la fakto, ke iu radio-amatoro portis al la Esperanto-klubo en Ballarat poŝtkarton kun *stranga lingvo*. Tio pruviĝis Esperanto kaj li invitis S-ron Brkić al sia hejmo kie li parolis kun la malproksima radio-amatoro. La afero kaŭzis grandan bruon en radio-rondoj kaj nun tre multaj amatoroj volas akiri Esperanton por plivastigi sian agadkampon! Gratulon al niaj Aŭstraliaj gesamideanoj! Vasta alskribo helpus: Esperanto-klubo de Ballarat, Vict., Aŭstralio.

Kongreso en Salzburg

De la 17-a ĝis 21-a de majo 1950 okazos en Salzburg, Aŭstrujo la 2-a Kongreso de I.F.E.F. Pro speciala kurzarango eksterlandanoj povas ĝui grandajn privilegiojn en Aŭstrujo ĉi-jare. Pri ĉiuj detaloj rilate al la kongreso oni sin turnu al: Org. Kongreskomitato, Postfach 65, Salzburg, Aŭstrujo.

Ad
Esper
FrancKo
Pariz

Ko

Kong

Edzo

Junu

Subt

ka

En

enkal

junul

anta

Pr

kong

L.K.

Ar

hava

litera

Koni

la U

La

bran

(1)

(2)

(3)

(4)

(4)

(5)

(6)

(7)

(8)

(8)

(9)

(9)

(10)

(10)

(10)

(10)

(10)

(10)

(10)

(10)

(10)

35-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Parizo 5-12 aŭgusto 1950

Ĝeneralaj informoj

Adreso : 35-a Universala Kongreso de Esperanto, 62 avenue de Clichy, Paris 18, Francujo.

Kongresejo : La Sorbonne (Universitato de Parizo).

Kongreskotizoj :

Kongresano	fr. fr. 2000
Edzo aŭ edzino de kongresano 1000
Junul(in)o ne pli ol 20-jara 500
Subtenanto (ne ricevos kongreskarton) minimume 1000

En tiu malalta kotizo por junulo ne estas enkalkulita la prezo de la kongresa libro. Do, se la junulo deziras tiun libron, li povos mendi ĝin antaŭe. La prezo estas fr. fr. 200.

Presafaj disdonotaj en la Kongresejo aŭ en la kongresaj kunvenoj devas esti aprobitaj de la L.K.K.

Salutoj : ĉe la Solena Malfermo oni rajtos saluti en la nomo de registaro nur se U.E.A. estos antaŭe ricevinta oficialan informon de la koncerna Registaro.

Ĉiu Landa Asocio devas informi U.E.A. antaŭ la fino de julio pri la nomo de la delegito, kiu salutos en ĝia nomo.

Naciaj kostumoj : se sufiĉe da gekongresanoj havos aŭtentikajn kostumojn — ni akcentas : aŭtentikajn—oni okazigos dum la granda paŭzo de la balo, je noktomezo, revuon de naciaj kostumoj. Tial, estas konsilinde kunporti ĉi tiujn.

Limigo : Notu la jenan gravan informon pri aliĝoj al la Kongreso : **Ni ne akceptos kongresaliĝojn post la 1-a de Julio 1950.**

Loĝejoj : Informon pri loĝejoj la L.K.K. sendas al ĉiu aliĝinto.

Literatura konkurso Provizora Regularo

Art. 1 : La Literatura Konkurso de U.E.A. havas la celon evoluigi la originalan kaj tradukan literaturon en la internacia lingvo. La Literatura Konkurso okazas sub la aŭspicoj de U.E.A. dum la U.K. de Esperanto.

La Literatura Konkurso enhavas la jenajn branĉojn :

- | | |
|--|--|
| (1) Poezio originala | } ĉiu poemo maksimume po 30 versoj. |
| (2) Poezio traduka | |
| (3) Prozo originala (noveleto, fabelo, fablo) | } ĉiu prozaĵo maksimume po 300 maŝinskribitaj linioj (ĉiu linio proksimume 65 spacoj). |
| (4) Proza traduko (noveleto, fabelo, fablo) | |
| (5) Kanto originala | } ĉiu kanto maksimume po 30 versoj. |
| (6) Kanto traduka | |
| (7) Teatraĵeto originala | } Daŭro maksimuma, 25 minutojn. |
| (8) Teatraĵeto traduka | |
| (9) Humoraĵoj (anekdotoj, dialogoj, monologoj), originalaj | } Ĉiu maksimume po tridek maŝinskribitaj linioj (ĉiu linio, proksimume 65 spacoj). |
| (10) Humoraĵoj tradukaj | |

La Estraro de U.E.A. povas decidi, ke la Konkurso enhavu ankaŭ aliajn literaturajn branĉojn, aŭ ke ĝi okazu nur pri unu aŭ pri pluraj el la supraj branĉoj.

Art. 2 : La Literaturan Konkurson de U.E.A. rajtas partopreni ĉiuj Esperantistoj, kiuj aliĝis al la koncerna U.K. Ĉiu partoprenanto en la Konkurso devas sin skribe anonci al la Prezidanto de la Komisiono aŭ al la L.K.K. minimume tri tagojn antaŭ la tago de la Konkurso, aldonante kopiojn de la literaturaĵoj per kiuj li aŭ ŝi deziras konkursi. Estas tamen dezirinde, ke la partoprenantoj anoncu sin kiel eble plej frue al la L.K.K. Al tradukoj oni aldonu ankaŭ kopiojn de la originaloj.

Art. 3 : Unu persono rajtas partopreni en la Konkurso per maksimume tri verkoj tradukaj aŭ originalaj, de kiu ajn el la supraj kategorioj, ĝis la Konkurso ne publikigitaj. La Komisiono povas, escepte, allasi al la Konkurso ankaŭ plurajn verkojn de la sama persono.

La Komisiono sciigas la partoprenantojn en la Konkurso plej malfrue la tagon antaŭ la Konkurso, pri la allasitaj verkoj. La Komisiono ne allasos al la Konkurso verkojn jam publikigitajn kaj tiujn, kiuj havas nenian artan valoron.

La konkursantoj publike legas la allasitajn verkojn. En okazo de Art. 1 (n-roj 7 kaj 8) la teatraĵetoj povas esti ludataj de aktoroj aŭ legataj de pluraj personoj.

Art. 4 : Por ĉiu Literatura Konkurso, la Estraro de U.E.A. nomas Komisionon, konsistantan el Prezidanto, kvar membroj kaj du anstataŭantoj, el inter konataj geesperantistoj, precipe verkistoj, kritikistoj, membroj de la Akademio kaj ĵurnalistoj.

La Komisiono decidas pri la allaso de la verkoj kaj pri la gajnantoj de la Konkurso. Ĝi aparte prijuĝas la originalajn kaj aparte la tradukajn verkojn laŭ la supraj kategorioj (Art. 1. par. 2). En ĉiu el la kategorioj po tri verkoj estas premiataj. La premiataj verkoj povas esti de la sama aŭ de diversaj aŭtoroj (konkurantoj). Decidinte pri la gajnantaj verkoj, la Komisiono decidas, kiu el ili estas la unua, kiu la dua, kaj kiu la tria en ĉiu el la supraj kategorioj.

Art. 5: La Komisiono decidas per absoluta plimulto (tri voĉoj). Se pri iu decidota punkto ne estas atingita absoluta plimulto (tri voĉoj), oni revoĉdonigas la verkojn, kiuj ricevis po du voĉoj. Se nur unu verko ricevis du voĉojn, oni revoĉdonigas la verkojn, kiuj ricevis po unu voĉo, kaj tiamaniere oni decidas pri la plej bona aŭ plej bonaj inter ili. Poste oni ankoraŭfoje voĉdonas nur pri tiuj verkoj, kiuj dum la unua aŭ dua voĉdonoj ricevis relativan aŭ eĉ absolutan plimulton.

La solaj kriterioj, laŭ kiuj la Komisiono juĝas, estas la enhava kaj forma valoroj, kiel ankaŭ la lingva nivelo.

Art. 6: La titolojn de la premiitaj verkoj kaj la nomojn de iliaj aŭtoroj oni proklamas dum unu el la Kongresaj kunvenoj kaj publikigos en *Esperanto*.

Laŭ ebleco la premiitaj verkoj estos publikigataj en *Esperanto*.

U.E.A. povas doni al la gajnintoj libropremiojn aŭ aliajn premiojn.

Somera Restadejo Esperantista

De la 26-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto, do ĝuste la semajnon antaŭ la U.K. en Parizo, la grupo *Bona Stelo* en Romans organizos Someran Restadejon. Romans situas tre oportune 625 km. de Parizo, 100 km. de Lyon, 80 km. de Grenoble, 250 de Marseille, en vizitinda regiono. Frukstarbaroj abundas en la valo. La kadro de la Somera Restadejo estos ideala, en kastelo kun ĉiaj komfortoj, uzata kiel mastruma lernejo. La prezoj estas kiel eble plej malaltaj. Ne hezitu anonci vin ĉar oni disponas maksimume 40 litojn. Por ĉiuj informoj oni sin turnu al: Grupo Bona Stelo, 31 rue Pêcherie, ROMANS (Drôme) Francujo. Nordlandanoj sin turnu senpere al S-ro Friis, Ingemannsvej 9, AABYHØJ, Danlando, kiu organizas karavanon.

Ĉeĥoslovaka poŝto atentis Esperanton

La Ĉeĥoslovaka poŝto eldonis serion de 32 bildaj poŝtkartoj el kiuj 4 portas la jenajn Esperantlingvajn surskribojn:

2. Praha—Esperantista centro en koro de Eŭropo

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO SERVA CENTRO

Palais Wilson, Ĝenevo, Svislando

Ŝlosiloj de U.E.A. Ni memorigas, ke la eldono de ŝlosilo estas afero de licenco. Pri la kondiĉoj de tia licenco informas la Serva Centro. La serio de nun haveblaj ŝlosiloj reduktiĝis ĝis 20. Ne plu haveblaj estas la Araba, Bulgara, Germana, Itala, Pola, Rumana, Ukraina, kaj Slovaka. Serio de ŝlosiloj en 20 lingvoj estas sendata kontraŭ pago de 3 svisaj frankoj aŭ 8 ĝuste stampitaj respondkuponoj.

Biblioteko de U.E.A. Ni kun plezuro anoncas, ke la laboroj por re-instaligo de la Biblioteko de U.E.A. baldaŭ finiĝos, kaj ke sub iuj kondiĉoj ni povos pruntedoni bibliotekojn al interesatoj por studceloj. Ni ree atentigas eldonistojn, ke ili bonvolu sendi ekzempleron de ĉiu aperanta verko al ni por ke la Bibliografiaj laboroj daŭru.

Enciklopedio de Esperanto. La prilaboro pri la *Enciklopedio* iom haltis sekve de malklara situacio. Jam evidentigis, ke la eldonisto de *Literatura Mondo* en Budapeŝt ne povas preni sur sin la riskon eldoni la verkon. La redaktoro informas la samideanojn, kiuj lastatempe sendis materialon, ke la laboroj rekomenciĝos kaj ke detala informo pri tio aperos en *Esperanto*. Ni atentigas, ke ne temas plu pri tria volumo al la jam aperintaj du, sed pri novredakto aŭ transformo de la tuta materialo tiel, ke proksimume 960 paĝoj da teksto enhavu ĉion dirindan. Temas nun trovi eldoniston, kaj la redaktoro danke akceptos proponojn, konsilojn aŭ sugestojn.

Redakcio de Esperanto. Je nia artikolo pri eventuala transformo de nia revuo—kompreneble sub sama titolo—laŭ formo de *Reader's Digest* (vidu numeron de februaro) venis aro da korespondadoj, kiujn ni analizis kaj pri kiuj ni raportis antaŭ la Kongreso. Kelkaj legantoj bonvolis detale trakti la principan demandon kaj doni valorajn ideojn. Al ĉiuj, kiuj bonvolis respondi kaj montri sian intereson je pliintereso de nia organo, ni afable dankas.

Hans Jakob,

Genevo, 28 feb. 1950

Honorigita Administranto.

5. Ostrava—Radiostacio en ĉeĥoslovaka regiono de karbo
8. Turčiansky Sv. Martin—Sidejo de Slovaka Esperanto-Instituto
24. Doksy—Somera Esperanto-Kolegio

La poŝtkartojn liveras Esperanto-Asocio en ĈSR, Malá Štěpánská 7, Praha II. Unu ekzemplero adresita al la petinto kostas 1 rpk. Ekster-eŭropaj samideanoj ricevos unu karton senpage. Neuzitajn kartojn en koverto la Asocio ne povas sendi.

Prof. D-ro I. Lapenna en Islando

Dum marto Estrarano Prof. D-ro I. Lapenna estis en Islando, kie li faris kursojn kaj prelegojn en la kadro de la tiulanda asocio *Aŭroro*. La ĉefa organizanto estis S-ro Magnus Jonsson, prezidanto de *Aŭroro* kaj FD. de U.E.A. Post la prelegvojaĝo Prof. Lapenna reveturos al Britujo por la Paskaj kunsidoj de la Estraro kaj post tio faros prelegvojaĝon tra Britujo. Ni esperas presigi en nia maja numero raporton pri la Islanda vizito.

La adreso de Prof. Lapenna ĝis mezo de majo estos: c/o British Esperanto Association, 140 Holland Park Ave., LONDON, W.11.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe U.E.A.



***La vojoj estas nekonataj** de L. Kassak; el la Hungara trad. L. Spierer. Eld. Libro-servo de F.L.E., Amsterdam. 20.5 × 14cm. 177 p. kartonita

kun tola spino; prezo 6 ŝil. afranko 6p.

La konata serio de verkoj el la ĉi-supre menciita eldonejo atingis tiel altan nivelon laŭ formo kaj enhavo, ke kiam trafas en la manojn nova romano oni jam sentas anticipan vibron de plezuro. Precipe pri la lingva kvalito de FLE-libro oni antaŭsentas nenian maltrankvilon. La stampo de la *Literatura Komitato* estas garantio pri fidela prilaboro pri la manuskripto.

La vojoj estas nekonataj povus esti aludo pri la misteraj fluoj kaj reagoj de la emocioj de la ĉefroluloj en ĉi tiu iel nekontentiga romano; ĉar malgraŭ la nerezistebla allogo, kiun reciproke sentas al si la riĉa bienposedantino Julia kaj la hazarde dungita vagabondo Danielo, ili restas fremdaj unu al la alia ĝis la fino. Ilia intimiĝo estas kunveno nur de korpoj sen ia reala kunfandiĝo de spirito, kaj kun la pliiintensiĝo de la erotiko de la virino, kreskas en la viro timo antaŭ la katenoj, de karnaj deziroj forĝataj, kiuj minacas ligi lin por ĉiam al la medio en kiu li momente sin trovas, kaj kondamni lin al bovineca ekzisto en banala vivo de bagateloj.

La aŭtoro pentras per inspirita peniko la malsaton kaj mizeron de la ministoj kaj arbar-laboristoj, baraktantaj kontraŭ ekspluato nur obtuze perceptata, kaj vigle redonas la atmosferon, konatan de ĉiu laboristo en ĉiu mondparto, de striko kaj intrigo industria. Malgraŭ tio tamen la striko kaj la diversaj ekscitoj pruvigas nur incidentoj en la historio tra kiu fadenas la interludo de emocioj inter la ĉefpersonoj. Ĉiuj aliaj personoj malgrandas preskaŭ ĝis fantomeco kompare kun Julia kaj Danielo, kaj verŝajne en tiu faktoro kuŝas la malforto de la verko entute. Ne posedante la psikanalizan kompetenton por ĝisfunde riveli kaj ekspluati la naturojn de la protagonistoj, la aŭtoro vane provas kompensi tiun mankon per devioj de la centra temo—cetere bonege prezentitaj—sed kiuj sukcesas nur krei impreson, ke io granda, kataklisma estas okazonta. La kulmino fakte estas tre neimpresa, eĉ, oni povus diri, malglora. Danielo, gravediginte Julian, ekprenas sian tornistran kaj, same senbrue kiel li venis, ŝteliras el la domo en la frumateno kaj direktas sin al la montoj, al la vojoj nekonataj.

La tuto do estas nur epizodo, kaj laŭ la naturo de epizodoj, havas efemeran karakteron. Ĝin

leginte, mi pensis al iuj komponaĵoj de Liszt—ankaŭ Hungaro—kies eferveskaj kvalitoj sopirigas fine al io solida, kerneca. Rigardante la klopodojn de la verkinto motivigi la agojn kaj pensojn de Danielo, oni ne povas ne pensi ankaŭ al D. H. Lawrence, kiu faris la taskon tiom pli kapable kaj kompetente.

Entute do, mi taksas ĉi tiun inter la malpli sukcesaj eldonaĵoj de F.L.E.

La lingvo, kiel mi jam menciis, estas ĝenerale kontentiga, kaj la legado prezentas nenian malfacilon eĉ al mezgradulo. Unu afero estas inda je mencio. Mi rimarkis en aliaj verkoj tradukitaj el la Hungara kuriozan—por mi—uzadon jen de estanta, jen de pasinta tempo de la verbo.

Mi supozas, do, ke tio estas karakterizaĵo de la Hungara lingvo. En Esperanto mi trovas tion ĝena kaj iafaje eĉ konfuza. Historio estas io okazinta; sekve laŭ starpunkto de verkanto kaj leganto, la agoj estas prezentendaj per preteritoj. Valida rimedo estas la fojfoja transiro en la presenton por, per kontrasto, plivigli la impreson de aktuala. Ni en Esperanto krome akceptas la principon de la logika tempo. La subitaj transiroj de presento al preterito kaj inversen trotaksas la impresiĝemon de la leganto kaj sin trudas en la komprenon de la enhavo. Je ĉiu tia ŝanĝo de tempo la leganto devas fari psikan akrobataĵon, kiu finfine estas mortiga je estetika ĝuo de la teksto. Mi konjektas, ke tio estas unu el la aferoj, pri kiuj la eldonistoj petas indulgon, kiam ili anoncas, ke pro militaj cirkonstancoj ili ne povis interkonsulti kun la tradukinto.

Papero, preso kaj bindo bonaj.

M.S.

***Brulanta Sekreto kaj aliaj rakontoj** de Stefan Zweig. Trad. el la Germana K. R. kaj P. E. Schwerin. Eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd. 12 × 18.5cm., 159 p., broŝ. 3ŝ. 9p., afranko 3p.

De tempo al tempo oni renkontas libron, kiu tenadas la atenton kaj ekscitas la intereson de la leganto ĝis la lasta paĝo. La nova volumo de la *Epoko*-serio estas unu el tiaj libroj.

Heroldo de Esperanto jam en 1932 eldonis novelon de Stefan Zweig, la fama aŭstra verkisto, sed tiu unua lia verko en Esperanto multe diferencas de la nova novelaro. La *Okuloj de la eterna frato* estis orienta legendo. *Brulanta Sekreto* kun siaj akompanantaj rakontoj temas pri la moderna mondo.

La tradukintoj, el kiuj Paul Schwerin estas jam konata per sia *Gaja Leganto per Esperanto*, saĝe elektis novelojn, kiuj interesas multajn flankojn de la homo. La unua kaj plej longa el la kvar rakontoj priskribas al ni kiel, por ekkoni

virinon, juna barono cinike ŝajnis sin amikema al ŝia fileto. Akirante la patrino, la amanto neglektas la knabon, kiu, ŝaluza pri sia patrino, spionas la paron. Li ne komprenas la intrigon sed, timante ian minacantan katastrofon, provas kontraŭ ŝia volo malkunigi sian patrino kaj la baronon. La psikologia analizo de la rilatoj inter la tri homoj estas tre lerte farita.

La tri ceteraj rakontoj ne donas al la amo la gravan rolon de *Brulanta Sekreto*, kiun ĝi okupas en la unua novelo. La tria kaj kvara efektive ignoras ĝin, kaj la dua uzas ĝin nur kiel motivon por ekirigi malkeran rusan dizertinton trans Eŭropon.

La tria rakonto *La batalo pri la Suda Poluso* estas tute malfikcia kaj multe similas al la portugala *Lasta Vojaĝo de Scott*, kiu aperis en Esperanto en 1942. Estas interese observi, kiel tiu fama ekspedicio kun sia glora fiasko, sammaniere impresas ĉiun homon. Legantoj korektu unu malgrandan eraron sur paĝo 88. La ekspedicio forlasis Anglujon en junio 1910, ne en 1911.

La Reĝo Ludo la lasta novelo, majstre priskribas la strangan sorĉon de la ŝako al viro, kies sola okupo ĝi estis dum unu jaro da politika mallibereco. Oni preskaŭ kredas, ke oni mem povus fariĝi ŝakĉampiono se oni havus nur la necesan jaron da izoliteco!

Ĉiuj rakontoj en la libro estas tiel interesaj, ke legante oni ne pensas pri la stilo. Sed efektive la stilo de la traduko ne estas barilo inter la originala verkisto kaj la leganto. Nur du strangajoj iom ĝenas dum dua lego, nome la uzo de komo antaŭ multaj infinitivoj, kaj la ofta uzo de *ita* kie *ata* estus pli logika.

E. P. Ockey.

Feuillets encyclopédiques de documentation espérantiste. Plan d'ensemble. 1-re, 2-ème, 3-ème partie (Hors séries). Redaktis Louis Perret, 106 Cours du Dr. Long, Lyon, Francujo.

La nuna kajero de tiu ĉi franclingva dokumentado pri la tuto de nia movado kunigas diversajn tekstojn pri la uzado de internacia lingvo en diversaj branĉoj de la homa agado (turismo, dogano, teatro, kino, k.a.) kaj krome la titolojn por la unuopaj partoj de tiu ĉi grandstila verko. La redaktoro de tiu ĉi *folietoj* entreprenis laboron, kiu miaopinie ankoraŭ ne estas sufiĉe taksata. Malgraŭ tio, ke la ĉefa lingvo estas la franca, la Esperantisto alilingva povas eltiri utilon el tiu ĉi dokumentado. Ĝia praktika arango (maksimume kompleta, ĉiam kompletigebla per aldono) kaj ĝia vere malalta prezo instigas onin aboni al tiu ĉi *folietaro*. Gratulon al la kuraĝa redaktoro al kiu ni deziras multan sukceson kaj kontenton.

H.J.

Ricevitaj :

Tutmonda Katolika Adresaro Esperantista. Eld. L. OhUiginn, Bothár Glasárd 16, Dublin, Irlando. prezo 2 rpk. aŭ 9p.

Manuale di conversazione Italiano-Esperanto. Eld. A. Paolet, San Vito al Tagliamento, Italujo. prezo nemontrita.

La Interligilo. Speciala eldono kun katalogo de oficialaj poŝtaĵoj kun Esperanta teksto. Kovertoj, Kartoĵoj, Markoj. Administracio : I.L.E.P.T.T., 46 rue Lamartine, Paris 9, Francujo.

Digĥa Nikajo : Sutoj I-XIII. Prezento de kanona skribaĵo de budhismo en Esperanto. Ricevebla ĉe : G. H. Yoxon, 16 Grange Drive, Heswall, Cheshire, Anglujo. Prezo nemontrita.

INTERNACIA KONKURSO 1950

Jen la tabelo pri la stato je la fino de Februaro. Gratulon al Hispanujo, la unua lando atingi la kvoton. Kelkaj aliaj landoj faras rapidan progreson, kaj sendube la venontaj du-tri monatoj montros atentindajn ŝanĝojn. Ĉiu faru sian plej bonan por helpi al sia lando !

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Hispanujo ..	600	715	119.2
2. Urugvajo ..	250	240	96.0
3. Sudafriko ..	250	225	90.0
4. Izraelo ..	250	220	88.0
5. Finnlando ..	1800	1465	81.7
6. Svislando ..	1300	1050	80.7
7. Germanujo ..	2000	1510	75.5
8. Svedlando ..	4900	3625	74.0
9. Britujo ..	12500	9160	73.3
10. Maroko ..	250	180	72.0
11. Nederlando	5100	3170	62.1
12. Italujo ..	1450	890	61.4
13. Brazilo ..	2200	1313	59.7
14. Usono ..	3100	1850	59.7
15. Francujo ..	5200	2959	56.9
16. Kanado ..	250	140	56.0
17. Nov-Zelando	850	465	54.7
18. Hungarujo ..	1400	750	53.6
19. Danlando ..	3100	1650	53.2
20. Argentino ..	1000	530	53.0
21. Aŭstralio ..	900	465	51.6
22. Belgujo ..	2000	980	49.0
23. Irlando ..	250	110	44.0
24. Islando ..	660	235	35.6
25. Pollando ..	4650	1275	27.4
26. Norvegujo ..	1500	345	23.0
27. Aŭstrujo ..	700	90	12.8
28. Ĉeĥoslovakujo	4200	395	9.4
29. Jugoslavujo	3600	170	4.7
30. Egiptujo ..	250	10	4.0
31. Bulgarujo ..	1300	20	1.5

Ĉu viaj amikoj estas membroj de U.E.A. ?
Se ne, varbu ilin !

Ritchie

Infan
en la S
estas la

Iluzio
porĉiam
pli malv
Kredu
(februar
okciden
min est
estas tr
kapuĉo,

La m
kiu ege
kovrita
mistero
konden
konvint
dezertp
Walter,
mejlojn
blankan
dek mi

Serge
kontraŭ
eksigint
Legio, l
li estas
Oued G
signifas
Tio esta



Ritchie Calder :

HOMOJ KONTRAŬ LA DEZERTO

Projekto de UNESCO

ĉe La Puto de Igli

Infanjaraj iluzioj pri la Saharo rapide foriĝas en la Saharo mem, kie la sole reala iluzio fakte estas la miraĝo.

Iluzio plej malamata de mi estas tiu pri la porĉiama varmeco de la dezerto. Mi iafoje estis pli malvarma en la Saharo ol mi estis en Grenlando. Kredu al mi, nun estas vintro en la Saharo (februaro) kun tranĉile akra vento en la nord-okcidento. La Franca oficiro, kiu akompanas min estas saĝa ; li portas la araban *burnuson*, kiu estas tre utila vesto de la nomadoj—kombinaĵo el kapuĉo, surtuto, dormtuko kaj unupersona tendo.

La malvarmo furiozigis Georgon, geofizikiston, kiu ege volis fotografi *blankan dunon* (t.e. prujne kovrita sabloduno). Ĝi reprezentas parton de la mistero de la hidrologia ciklo : akvo-vaporiĝo-kondensiĝo-akvo-putoj, en kio la sciencistoj konvinkiĝis, ke ili havas la praktikan solvon de la dezertproblemo. Georgo ĉagreniĝis, ke Serĝento Walter, intendantato de la akvobarilo ĉe Igli, 25 mejlojn norde de Beni Abbes, kelkfoje vidas la *blankan dunon* ofte de unu semajno, dum ĝis dek minutoj ĉiufoje.

Serĝento Walter estas klasika tipo de homo kontraŭ la dezerto. Giganta 65-jara Germano, ekŝiĝinte el militservo en la Franca Fremdula Legio, li tamen ne povis forlasi la dezerton. Nun li estas la sola blankulo, intendantato pri la akvo ĉe Oued Guir je ĝia kuniĝo kun Oued Souara. Oued signifas *vadio* en pli orientaj partoj de la teritorio. Tio estas intermite fluanta rivero. En tempo de



Tipa pejzaĝo, prezentanta defion al la sciencistoj

plenfluo la rivero torentas el la Atlasa Montaro kiel akvomuro, iafoje 10 futojn alta. Dum nur kelktaga periodo ĝi fluas kiel rivero, etendas sin trans la valojn, kaj finfine malaperas en la sablaj dezertoj sude. Serĝento Walter prizorgas, ke la fluego estu direktata en irigaciajn kanalojn kaj basenojn, kie ĝi iom pli longe restos.

Povas esti, ke ni fariĝos legendaj homoj en la dezerto, kiel . . . pluvofarantoj ! Okaze de nia vizito, venis la unuaj pluvoj al Nordafriko, la unuaj neĝoj venis al la Atlasmontaro kaj la pluvo al la Alta Ebenajo ! En unu loko sub senombra ĉielo arabo urĝe laboregis farante irigaciajn kanalojn. Li diris, ke venos *crue* (subita river-fluego). Du horojn poste amasiĝis minacaj fulmotondraj nuboj, kiuj transformis tagon en nokton. Nin trafis nur ĝia franĝo, kaj la plenforto rompiĝis super la montoj.

La fulmo en dezerto faras strangajn aferojn. Trafante dunon ĝi iafoje kunfandas la sablon en vitron ! Kiel memoraĵon de mia vizito mi posedas vitran tubon el *fulmovitro*.

Tiel malaperis ankoraŭ unu iluzio—pri senpluva dezerto.

Ĉi tiu malabunda pluvo tamen ne estas solvo en si mem de la dezertproblemo, ekster tio, ke ĝi estas parto de la naturaj kondiĉoj kaj cikloj de la regiono. Sur rokterenoj la pluvo simple vaporiĝas, sed sur duno ne necese tiel okazas. La dunoj similas al spongo kaj ili ŝajne sorbas akvon el la roso aŭ pluvo desupre kaj ankaŭ per suprenpenetrado el la subaj akvoportaj tavoloj.



[Foto : R. S. Kleboe

Ritchie Calder en Norda Afriko

Ĉi tiu spongeco klarigas la ekziston de la *foggara*, tuneloj videblaj sur la krutaĵoj, el kiuj akvo fluas en ĉiu sezono. Ĉi tiuj tuneloj penetras mejlojn en la teron, kondukante akvon. Ili estas tre antikvaj, elfositaj de sklavoj en falema tero. Nun ili iom post iom ŝtopiĝas ĉar sklavoj ne plu estas uzablaj, kaj mankas mekanikaj anstataŭaj maŝinoj.

Fortikaĵo Abadla

Laŭ la leĝo ni liberigis sklavojn, sed ili fakte ankoraŭ ekzistas, diris al mi Kolonelo Quenard, administranto de teritorio pli granda ol Francujo mem. Li klarigis, ke la tero kaj rajtoj pri akvo apartenas al tre malmultaj personoj—la Arabaj grandsinjoroj, la ĉefoj kaj iliaj familoj. Por ili la senteruloj, plejparte negrodevenaj, laboras por siaj vivrimedoj. Ili estas pagataj per mangajaĵo—tia kia ĝi estas—kaj ŝirmo. La ŝirmo povas esti la labirinto de la *Ksar*, enfermita vilaĝo kies stratetoj estas nigraj tuneloj kun dormlokoj supre kaj staloj sur la teretaĝo. Alternative ĝi povas konsisti el domaĉoj el sunbakita argilo, fluidiĝema sub pluvotorento. Salajro ne ekzistas, sed en malbonaj tempoj ili ne malsatas. La sola eliro el ilia servuteco estas, migri al la eĉ plia mizero de la nordaj havenoj, jam tre plenaj de enmigrintoj el la dezerto.

Taghit estas *bildkarta* dezertloko. Ruĝa Legia fortikaĵo gardas oazon en valo inter la dunoj. Rigardante desupre de la fortikaĵo oni dirus, "Jen ia paradizo" kaj juĝante laŭ la pluraj templetoj dediĉitaj al mahometanaj sanktuloj, sendube ĝi estas io tia por la Araboj. Tamen por la 3000 enloĝantoj la sola nutraĵo estas daktiloj kaj akvo. Ili ne vidas panon ĉar mankas al ili la aĵoj per kiuj ili povus aĉeti farunon. La riverfluejo estas dike kovrata de salo. Oni intencas provi la kulturadon de tabako tie, por interŝanĝo kontraŭ faruno.

Abadla, 60 mejlojn okcidente, estas tute alia. La aliro al la valo Guir estas tra minaca teritorio. Transirinte montkreston oni tamen subite vidas brilan verdon, kiu surprizas pro kontrasto kun la kutimaj polvaj kaj grizaj kreskaĵoj de la Saharo. Tie, meze de dezerto, estas tritika kampo, kaj apud ĝi troviĝas prospera legomĝardeno de la armea posteno.

La surfaco de la valo Guir estas betonfirme sunbakita riverslimo, eroziita el la Maroka Atlasmontaro kaj postlasita de la riverfluejo. Agrikulturaj inĝenieroj montris, kiel ili rompas la surfaceton per traktoroj kun grundrompiloj kaj diskplugiloj por trovi la malseketan fekundan subteron. Oni projektas krei terunuojn el po 1000 akreoj por kolektiva kultivado, ĉiu kun malpeza traktoro kaj la necesaj iloj. La Araboj posedos siajn bienojn kaj transdonos kvinonon de la rikoltoj por uzo en aliaj partoj de la Saharo.



Oazo en la dezerto, pruvante, ke kie kreskas arboj, tie oni povas kultivi

Ĉi tiu valo estas longa 50 mejlojn kaj larĝa 3 mejlojn. Eble finfine, 125,000 akreoj estos kultiveblaj. La akvodirektado okazos per la Araba sistemo de malaltaj akvobariloj, kiuj formas malprofundajn basenojn por la kolektiĝo de sedimento. De tempo al tempo la fluo estos direktata laŭ aliaj vojoj kaj tiel oni riĉigos la teron.

Povas esti, ke la Kartaganoj kaj Hanibalo akiris siajn elefantojn el ĉi tiu regiono ĉar en 47 p.K. Suetonius Paulinus raportis, ke ekzistas granda arbaro en kiu abundas elefantoj kaj aliaj bestoj. Tamen pli ol 1000 jarojn poste la Araboj forhakis la arbojn.

Kenadsa Karbminejo

Virinoj, kameloj kaj azenoj estas la ŝarĝbestoj de la Saharo. Ĉiam restos ĉe mi memoro pri karavano de virinoj, kiuj surŝultre portis kamelŝarĝojn el ligno, marŝantaj trans la dunojn en la tagmeza varmo. (Alia memoro estas pri Arabo en burnuso iranta sur sia nikelita biciklo survoje al karbminejo en la Saharo. La du bildoj ne estas sen interligiteco).

Ni scias, ke la Saharo povas esti terure malvarma, kaj la nomadoj ne nur bezonas brulaĵon por sia kuirado sed ankaŭ por varmigo dum la noktoj. Ligno malabundas. Por trovi ĝin oni vojaĝas eĉ semajnon de siaj oazoj. Kiam oni trovas arbojn oni detruas ilin! Tiel nova terpeco fariĝas malstabila moviĝema sablo, minacanta inundii alian fekundan terpecon.

Sekve brulaĵo estas nur duaranga laŭ graveco post la akvo.

Okcidente de Colomb Bechar estas karbminejo meze de la dezerto. Laboras tie 4,500 ministoj, kiuj elfosas 30,000 tunojn da karbo ĉiumonate. Ĝi estas akirata per galerioj fositaj en la dekliva

tavolo
surfaco
dika nu
tamen
Bechar
hejtado
vagana
mejlojn
dikan t

S-ro
(Usono
asertas
li tamen
alia li v
la sune
lin, sed

Se l
atomb
maŝino
povus
kiel br
kunligo

Oni
ĉar sul
la Atla
kaj ori
Zelfan
la tiel

Tamer
energie
altkost
forto s

Ĉi ti
Calder,
aperant
teksto e
fonton l
rajtas r
Angla r
Calder.

Esper
UNESCO

La a
Esper
pli-ma
laŭ la
rimarl
konklu
nia c
Esper

Pri
venda
profite
Tute c
ĝi alpe

tavolo de karbo, kies finaĵoj sin montras ĉe la surfaco de la montoflanko. La karbtavolo estas dika nur 16 colojn kaj ĝi estas malaltkvalita. Ĝi tamen taŭgas por la elektro-stacio de Colomb Bechar, por la loka cementfabrikejo kaj por la hejtado de la lokomotivoj de la transdezertaj vagonaroj. Oni eĉ eksportas al Hispanujo, 1000 mejlojn for. Oni ĵus eltrovis pli bonan kaj pli dikan tavolon 40 mejlojn sude.

S-ro Wallace, oleo-spertulo el Oklahoma (Usono), vera tipo de *homo kontraŭ la dezerto*, asertas, ke ekzistas oleo sub la Saharo. Pli detale li tamen rifuzas paroli pri tiu trezoro. Pri ĉio alia li volonte parolas kaj lia preferata temo estas la sunenergio. Tio estas ideo, kiu obsedas ne nur lin, sed ankaŭ plurajn sciencistojn.

Se la sciencistoj nur povus dediĉi sin ne al atombomboj, sed al elpensado de praktika maŝino por ekspluato de la suna energio ni povus kultivi la Saharon. Anstataŭ esti detruata kiel brulaĵo, arboj kaj vegetaĵoj kreskadus kaj kunlige konservus la teron kontraŭ forbloviĝo.

Oni krome diras al mi, ke **ni paŝas sur akvo**, ĉar sube estas vasta subtera lago etendiĝanta de la Atlasmontaro ĝis profunde sude en la Saharo, kaj oriente ĝis la marbordo de Tunizio. Jam ĉe Zelfana troviĝas nova oazo provizata de akvo el la tiel nomata *Albienne*-tavolo, 4,000 futojn sube. Tamen por bori ĝis la necesa profundo multe da energio estas bezonata kaj oleo nun estas tro altkosta por tiu celo. Povas esti, ke iam la suna forto solvos tiun problemon.

Ĉi tiu artikolo, raporto de la fama ĵurnalisto Ritchie Calder, estas resumo en traduko de **E. D. Durrant** de serio aperanta en la ĵurnalo *News Chronicle*. Represo de la teksto estas permesata **kondiĉe nur, ke oni citu la originalan fonton kaj Esperanto**, organo de U.E.A. **La bildojn oni ne rajtas reprodukti**. Ni deziras esprimi nian dankon al la Angla revuo *Picture Post* pro prunto de la foto de Ritchie Calder.

Esperanto publikigas ĉi tiun artikolon en kunlaboro kun UNESCO (vidu la martan numeron).

ANKORAŬ PRI ESPERANTAJ LIBROJ

La artikolo de S-ro Wilgenhof (februara n-ro de *Esperanto*) estas tre interesa kaj lia statistiko estas pli-malpli ĝusta. Li tamen verkas ĝin plejparte laŭ la starpunkto de leganto. Sekve, kelkaj rimarkigoj de sendependa eldonejo eble modifos la konkludojn de legantoj de tiu kontribuaĵo. Unu nia celo estas klarigi, kial oni ne vidas en Esperanto ampleksajn sciencajn verkojn.

Pri tio, ke ordinaraĵ enlandaj librovendistoj ne vendas Esperantajn librojn, ne temas nur pri profito de la libroservo de Esperantaj landasocioj. Tute certe, ordinaraĵ librovendistoj farus tion se ĝi alportus profiton. La problemo por ili estas,

ke ili ne povas teni stokon da Esperantaj libroj ĉar ne ekzistas sufiĉe da Esperantistoj en unu loko por pravigi tion; kaj ne valoras mendi librojn unuope ĉar la kosto de mendo kaj pago (eĉ se tio estus internacie ebela) forigas grandan parton de la profito. Esperantistaj librovendistoj tamen povas teni stokon de la plej ofte bezonataj libroj ĉar ilia merkato estas la tuta lando, ne unu urbo. Eĉ se oni ne havas libron en la momento de mendo, oni povas facile kaj rapide akiri ĝin, ĉu de la eldonisto, ĉu de la Libroservo de U.E.A.

Unue ni diru, laŭ dudekajara sperto, ke la Esperanta merkato preskaŭ tute ŝanĝiĝis en tiu periodo. Antaŭe la plej bone vendeblaj libroj estis la—ni diru—libretoj kun 40–80 paĝoj. Nun plej bone vendiĝas libroj kun 120–250 paĝoj kaj preskaŭ ĉiam oni preferas binditajn ekzemplerojn. Tio validas en okcidenta Eŭropo (al la orientaj partoj de Eŭropo ne eblas sendi librojn pro financaj malfacilaĵoj).

La Esperanta eldonisto nun devas fronti al du gravaj problemoj. Unue, la nuna alta kosto de libro. Por presigi libron kun proksimume 150 paĝoj oni devas elspezi proksimume 250 pundojn (tio estas, en Anglujo, kie nuntempe la preskosto estas la malplej altaj en Eŭropo). Antaŭnelonge ni eldonis lernolibron (5000 ekzemplerojn) kiu kostis al ni pli ol 600 pundojn. Nia kapitalo nun estas 2700 pundoj, sed ĝi evidente ne estas sufiĉe granda por ampleksa programo de eldonado. Pri lernolibro ekzistas konstanta postulo, sed la eldonisto devas atendi proksimume 6 jarojn por ricevi la kapitalon elspezitan. Por romano (eldono 4000) oni devas kalkuli je 10–20 jaroj! Estas do simpla konstato, ke oni povas daŭre eldoni novajn librojn nur se oni rapide kaj regule vendas la kurantajn kaj malnovajn.

La dua problemo estas eĉ pli gravá. Al proksimume 75% de la eventuala Esperanta merkato oni ne povas vendi librojn pro la neeble ricevi pagon; ekzemple en Ĉeĥoslovakujo, Jugoslavujo, Bulgarujo, Germanujo, Italujo, Hispanujo, Pollando kaj aliaj. Nur kiam la komerco estos denove pli-malpli libera povos ekzisti bona ŝanco por la Esperanta literaturo.

Intertempe oni devas eldoni tiujn librojn, kiuj plej bone vendiĝas; kaj **tiuj estas romanoj**.

Povus esti, ke ekzistas multaj Esperantistoj, volantaj aĉeti sciencajn verkojn, sed ili troviĝas disaj tra la mondo, kaj la plimulto ne povas aĉeti pro la kaŭzo jam citita. Estas senutile kompari ilin kun nacilingvaj eldonoj, ĉar tiujn oni povas vendi en la propra lando, kie jam ekzistas kaj merkato kaj pagokapablo. La Esperanta merkato **eble** ekzistas, sed la pagokapablo certe ne ekzistas. Jen la diferenco.

The Esperanto Publishing Co. Ltd.

20,000-JARAĜAJ PENTRAĴOJ

Artrezoro de la kaverno Lascaux (lasko)

Kvar lernejoj knaboj en 1940 ludis sur la deklivoj de monteto Lascaux, ne malproksima de ilia hejmurbo Montignac-sur-Vézère (Dordogne) en Francujo. Konstatinte, ke ilia hundo glitfalis en truon, ili kuraĝe kaj iom aŭdace glitiris post ĝin kaj malsupreniris distancon de proksimume 10 metroj. Ili staris en tuta mallumo ĝis kiam unu el ili bruligis alumeton. Je ilia granda miro ili konstatis, ke ili troviĝas en kaverno, kies muroj estas kovritaj per multekoloraj pentraĵoj de eksterordinaraj diversaj kaj kolorfreŝo.

Per la lumo de alumetoj ili vidis la bildon de granda nigra bovo, longa pli ol 15 metrojn, surmetitan sur plifruajn desegnojn de amaso da ĉevaloj kaj brutoj en bistro, ruĝo kaj nigro. Troviĝis ankoraŭ figuroj de urso kaj de komponita besto kun hufoj de bovo, branĉkornoj de vircervo kaj vosto de cervino. Preter tio troviĝis friso konsistanta el cervokapoj, arto de granda belo, bestoj trafitaj per la sep ritaj sagoj, graciaj ĉevaloj kaj *gazel*-bildo de praepoko—bisono (bubalo) kun harkovritaj flankoj, kun la kapo malalte kaj la intestoj elfalantaj, kiu ĵetas la aŭdacan ĉasiston ŝirintan ĝin per rudimenta lanco.

Ĉi tiun mirigan malkovron baldaŭ kontrolis loka instruisto kaj poste konataj ekspertizistoj. Je ilia rekomendo la kavernon ekprizorgis la Belarta Departemento.

Nur la kavernoj de Altmira en Hispanujo povas kompariĝi kun ĉi tiu trovaĵo. La feliĉa cirkonstanco de absolute seka kaverno kaj travebla kalkeca tegaĵo konservis ĉi tiujn pentraĵojn kun ilia origina freŝo dum periodo de —laŭ konjekto—inter 20,000 kaj 30,000 jaroj.


La kaverno laŭŝajne estis templo, sed ne loĝejo. Malgraŭ la certa ekzisto de iuj danĝeraj bestoj en la distrikto, preskaŭ nur utilaj bestoj estas pentritaj kaj multaj el ili estas inoj gravedaj, el kio oni supozas, ke la kaverno ludis ian rolon kiel fono por fekund-ritoj. Neniun endoman artiklon aŭ ilon oni trovis tie, kaj la solaj objektoj trovitaj estis fragmitsimilaj tuboj evidente uzitaj kiel primitiva penikego por ŝmiri la farbojn sur la murojn, prahistoria lanterno—pelvo el siliko kun muskaj meĉoj trempitaj en oleo aŭ graso.

La koloroj uzitaj estis simplaj kaj daŭraj—mangano, karbono, okro, kaj fer-peroksido, pulvorigitaj kaj miksitaj kun akvo.

Tia, mallonge, estas la ĝisnuna historio de la miriga Montignac-kaverno. Ĝi troviĝas proksimume 20 km. de Eyzies kaj estas atingebla per aŭtobus-servo el Périgueux.

M. Otiel.

Libere kompilita laŭ informoj donitaj de la Commissariat General au Tourisme, Paris, (Londona fako), al kiu ni esprimas nian plej sinceran dankon.



EN

Solv
MoièreGajr
S-ro A
(Aŭstr
post il
Ekstré
98 p.
93 p.
G. Tur

Solv

N-r
Slosily
saliko
esper
skarp
siropoN-r
modif
orang
taler
noktuEni
5 alta
11 sk
16 ka
21 ri
retin
oni a
ĉiuj
ĉi-sul
bono
6 sul
beste
10 n
12 p
15 le
19 ĝi
22 m
kun
mals
liter
provEr
5 ĉa
12 es
19 n
25 n
vorb
tiujr
klari
espr
el be
1 la
tolo
9 fri
14 c
18 a
23
estaEr
aŭ
finiĝ
Neni
Bon
ĉiu d

ENIGMA KONKURSO N-ro 47

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20A Avenue Molière, Brussel-Forest, Belgujo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 43-a konkurso : S-ro A. C. Coutinho (Braz.) 118 p., S-ro P. E. Schwerin (Aŭstralio) 117 p., S-ro C. Rogister (Belg.) 115 p. Sekvas post ili : S-ro A. E. Rosengaard-Hansen 105 p., S-ro I. Ekström 104 p., D-ro W. Manders 103 p., F-ino A. Reiné 98 p., S-ro J. Escaré, S-ro L. Staal 97 p., S-ro J. Soyeur 93 p., S-ro M. Taulil 92 p., S-ro D. Bevan 91 p., S-ro G. Turin 90 p.

Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 45 :

N-ro 96 : En la mizero oni ekkonas siajn amikojn. Ŝlosilvortoj : trofeo, baleno, lanuga, fatala, skvamo, saliko, zefiro, senato, krabo, pirolo, korano, sturno, gorilo, esperi, komika, skrapi, kloako, deponi, pirato, satiro, skarpo, salvio, diablo, grajno, melono, monato, drakmo, siropo, kreolo, motoro, emajlo, franko.

N-ro 97 : Manko de oro ne estas malhonoro. Ŝlosilvortoj : modifi, afusto, natrio, kapoto, optiko, daturo, edikto, orango, retino, orbito, negoco, ekzemo, elasta, sinodo, talero, agraf, sekalo, miasmo, akrido, livreo, hirudo, oriolo, noktujo, ovacio, rigora, okzalo.

Enigmo N-ro 101 : 1 planko, 2 patoso, 3 tirano, 4 regulo, 5 altaro, 6 striko, 7 Kristo, 8 albino, 9 trunko, 10 trofeo, 11 skalpo, 12 teraso, 13 skolto, 14 deponi, 15 ermito, 16 kareso, 17 rimedo, 18 satiro, 19 tereno, 20 klafto, 21 rikani, 22 solena, 23 kastro, 24 figuro, 25 gazelo, 26 retino, 27 fiakro, 28 kiraso. En ĉiu el la ĉi-supraj vortoj oni anstataŭigu unu literon per alia litero tiel, ke vi el ĉiuj sesoj da literoj povu novajn vortojn laŭ la ĉi-subaj klarigoj : 1 akvoveturejo, 2 karakterizilo, 3 bonodora floro, 4 manĝilo, 5 argenta germana monero, 6 subtera ĉambro de preĝejo, 7 insektomanĝanta mambesteto, 8 ne povanta vidi, 9 malmoliginta parto de io, 10 malalta temperaturo, 11 kavoj sub la ŝultra artikolo, 12 promenejo, 13 homego, 14 esprimo de malkontento, 15 leda strio, 16 plantonutraĵo, 17 malsano, 18 noktobirdo, 19 ĝi estas kaprica, 20 neeviteblaĵo, 21 malmolde trinki, 22 mamulego, 23 verko akre kritikanta ion, 24 paserbirdo kun koloraj plumoj, 25 ĉiutaga legaĵo, 26 sezono, 27 plena malsukceso, 28 gratante forigi ion. La anstataŭigitaj literoj formas en la sama sinsekvo esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof.

Enigmo N-ro 102 : 1 kaso, 2 fago, 3 arto, 4 bato, 5 ĉaro, 6 arka, 7 fako, 8 kalo, 9 bato, 10 lado, 11 kano, 12 esti, 13 ĉano, 14 kato, 15 koro, 16 kano, 17 milo, 18 kano, 19 maro, 20 lago, 21 moro, 22 rodo, 23 koto, 24 ĉeno, 25 mato, 26 komo, 27 kodo. Dividu ĉiun el la ĉi-supraj vortoj en du egalajn partojn kaj metu tri literojn inter tiujn du partojn tiel, ke ekestas vortoj laŭ la ĉi-subaj klarigoj. La mezaj literoj de la novaj vortoj tiam formas esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof. Ekzemplo : el *beno* oni tiel povas formi *be-nzi-no*. La klarigoj estas : 1 larĝmaŝa teksaĵo, 2 korpoparto, 3 malsano, 4 delikata tolo, 5 kunigaĵo, 6 malnoviĝinta, 7 laborejo, 8 veturilo, 9 fripono, 10 vegetaĵo, 11 frukto, 12 akompani, 13 trinkaĵo, 14 dika lanŝtofo, 15 birdo, 16 korpoparto, 17 strangajo, 18 arbo, 19 viktimo, 20 amasego, 21 timigaĵo, 22 konstruaĵo, 23 viandaĵo, 24 trabo, 25 korpoparto, 26 vestaĵo, 27 fabela estaĵo.

Enigmo N-ro 103 : Faru kiel eble plej multe da sesliteraj aŭ pli grandaj oficialaj nederivitaj substantivoj (do finiĝantaj per -o) el la literoj de la vorto KAREGULINO. Neniu litero estu pli ol unu fojon uzata en la sama vorto. Bonvolu alfabeto aranĝi la vortojn. (Unu poenton por ĉiu duo da vortoj).

ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Ĉiutage	14.45-15.00	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I. Ĉeĥoslovaka Radio, Esp.-sekcio, Stalinova 12, Praha XII.
	18.45-19.00	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
	21.00-21.15	Praha. 49.92m. P.
Lundo	05.30-05.35	Wien. 513m., 31m., 41m. I.
	07.15-07.30	Sveda Radio. 49.46m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7.
	15.15-15.30	Sveda Radio. 19.80m., 27.83m.
	16.30-17.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. Rádio Ministério da Educação e Saúde, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
	21.50-22.00	Praha 470m.
	Mardo	01.15-01.30
	11.50-11.55	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur, SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 28, Bern.
	17.35-17.40	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 13.94m. sur 25.39m. (Krom la unua mardo).
	23.45-24.00	Gvatemalo. 49m. I. Estación Cultural de la Voz de Guatemala, Guatemala Cd. C. Ameriko.
Merkredo	13.20-13.35	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan merkredon). Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.
	19.15-19.30	Warszawa III. 48.23m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
	21.50-22.00	Praha kiel lunde.
	22.00-22.45	Praha II. 470m., 315m., 219m. Verda Stacio nur la unuan merkredon. Stalinova 12, Praha XII, ĈSR.
Ĵaŭdo	11.50-11.55	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
Vendredo	08.05-08.20	Paris. 347m. K. (ĉiun duan vendredon).
	14.30-14.45	Graz. 240m. K. Radio Graz, Esperanto-Voĉo, Zusertalgasse 14/a, Graz, Aŭstrujo.
	15.40-15.55	Wien. 203m., 25m., 31m., 41m. I. Ĉiun duan vendredon. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la hor sistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Gravega : La instancoj en Francujo subite sciigis sian decidon ĉesigi la dissendojn el Parizo. Ni petas amasan alskribon al la stacio por peti daŭrigon de tiuj elsendoj. La adreso : Radio-diffusion Francaise, 118 Champs Elysées, Paris 8, Francujo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 225.

4-an de Marto 1950

La jenaj informoj alvenis tro malfrue por la jarlibro, nun presata. Ni havas esperon ke ĝi eliros antaŭ Pasko.

NOVA PERANTO

Kongo Belga

S-ro K. Braet, B.P. 223, Athénée Royal, Jadotville.

NOVAJ DELEGITOJ

Aŭstrujo

- Bregenz.** D : H. Ruedl, Achgasse 34. Tel : 2060.
Graz. FD (Oficistaj aferoj) : A. Podrepschek, Sackstrasse 16/L. Tel : 94-1-11/598.
Innsbruck. FD (Lingvoj) : H. Ölberg, Eugenstr. 5, Erzst. Tel : 74857.
Salzburg. FD (Instruado) : F. Föttinger, Kaserngasse 5.
Weikertschlag. D : Alois Miksche, Thaya ĉe Raabs/Th.

Belgujo

Bruzelles I. VD : F-ino M. Kestens, 24 Rue Bodenbroeck.

Britujo

Birmingham. FD (Kaŭĉuka industrio) : D. J. Langman, 37 Hart Road, Erdington, Birmingham 24.

Ĉeĥoslovakujo

T. S. Martin. FD (Teatro amatora) : E. V. Tvarožek, Ul. Ambra Pietra 3.

Danlando

Ingstrup. D : Harry Sørensen. Tel : 6.
København. FD (Martinus-instruado) : F-ino G. Olsen, Mariendalsvej 94-96, København F. Tel : Godthåb 9280.

Nederlando

Beverwijk. D : K. Wilgenhof, Wilhelminastraat 28.

Nov-Zelando

Auckland. FD (Konstruado) : J. G. Kennerley, 87 Kurahaupo St., Orakei, Auckland, S.E.2. Tel : 20300.

Svedlando

Kolmården. D : J. V. Pihlström, Solåkra. Tel : Norrköping 95006.
Malmö. FD (Akvokonduko) : S. Sjöblom, Södra Förstads-gatan 116. Tel : 14184.
 FD (Filatelo) : R. Demuth, Kalendegatan 29 b. Tel : 23894.
 FD (Instruado) : T. A. Edberg, Edward Lindahlgatan 18a. Tel : 68257.
Ränte. D : Malte Markheden. Tel : 60.

DUMVIVA MEMBRO

F-ino K. Walden, Ystad, Svedujo

PATRONOJ 1950

13. Toms, S-ro C. H., Freshwater, I.O.W., Anglujo
 14. Blacklock, S-ino A. L., Ipswich, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1950

179. Rogozinski, S-ro J., Łódź, Pollando
 180. Jansson, S-ro A., Oslo, Norvegujo.
 181. Carvalho, S-ro A. de M., Bebedouro, Brazilo
 182. Piauí, D-ro J. N., Rio de Janeiro, Brazilo
 183. Dionísio, S-ro C. H., Curitiba, Brazilo
 184. Carmo, S-ro J. de A. P., Rio de Janeiro, Brazilo
 185. Clavenna, S-ro A., Genova, Italujo

186. Scott, F-ino P. K., Andover, Anglujo
 187. Smith, S-ro N. R., Swindon, Anglujo
 188. Lebmacher, S-ro J., Errouville, Francujo
 189. Perrier, S-ro M., Strasbourg, Francujo
 190. Carlson, S-ro F., Seattle, Wash., Usono
 191. Clewe, S-ro J. F., Los Angeles, Cal., Usono
 192. Dillinger, S-ro H. E., Placerville, Cal., Usono
 193. Ceratti, S-ro N., Sao Paulo, Brazilo
 194. Gouvêa, S-ro F., Sao Paulo, Brazilo
 195. Kushlick, S-ro I., Johannesburg, Sud-Afriko
 196. Liebeck, D-ro S., Cape Town, Sud-Afriko
 197. Helfgot, S-ro S., Buenos Aires, Argentino
 198. Iglesias Nuñez, S-ro E., Buenos Aires, Argentino
 199. Blanco, S-ro M. R., Montevideo, Urugvajo
 200. Ciswicka, S-ino J., Gdynia, Pollando
 201. Ingster, D-ro A., Sosnowiec, Pollando
 202. Kaiserówna, F-ino W., Łódź, Pollando
 203. Kotarbinski, D-ro T., Łódź, Pollando
 204. Muszynski, D-ro J., Łódź, Pollando
 205. Rupp, D-ro J., Dabrowa Górna, Pollando
 206. Toczyski, S-ro J., Gdynia, Pollando
 207. Temerson, S-ro J., Łódź, Pollando
 208. Spies, S-ro L., Chingola, N. Rodezio
 209. Benedetti, S-ro J., Marrakech, Maroko
 210. Chapman, S-ro J. L., Palm Beach, Fla., Usono
 211. Gustafsson, S-ro K. E., Bergvik, Svedlando
 212. Nilsson, S-ro N. G., Göteborg, Svedlando
 213. Truba, S-ro E., Warszawa, Pollando
 214. Głinski, S-ro F., Warszawa, Pollando
 215. Sochatynski, S-ro W., Przemysl, Pollando
 216. Carlén, S-ro E., Hallabrottet, Svedlando
 217. Strapps, F-ino P., Ilford, Anglujo
 218. Bevan, S-ro G., Wrexham, Kimrujo.
 219. Relf, S-ro E. F., Bletchley, Anglujo
 220. Wilford, F-ino N., Nottingham, Anglujo
 221. Halbedl, D-ro A., Knittelfeld, Aŭstrujo
 222. Höfert, S-ro F., Wien, Aŭstrujo
 223. Jungschaffer, S-ro H., Ried i.L., Aŭstrujo
 224. Pot, S-ro C., Slikkerveer, Nederlando
 225. Aasgaard, S-ro F., Onsoy, Norvegujo
 226. Bugge-Paulsen, Kapt. R., Oslo, Norvegujo

DONACOJ. H. J. Bridger 30s., H. Milsom 2s. 6p., F-ino M. F. Clark 5s., E. Blake 2s. 6p., F-ino A. Baxter 10s., F-ino I. M. Cochrane 5s., F-ino R. M. Spencer 2s. 6p., D. Langman 5s., C. K. Sutcliffe 3s. 6p., H. C. Magel 5s. 6p., M. Cuené 5s., F. Knecht 1s. 9p., S-ro Chourauqui 2s., I. Polaszczuk 2s. 6p.

Sincera dankon al ĉiu helpanto

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Februaro, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Februaro 1949 :

	1949	1950
Asociaj membroj	1314	2577
Individuaj membroj :		
MJ	435	444
MA	2752	2917
MS	262	227
Patronoj	14	14
DM	178	194
HM	56	56
	3697	3852
	5011	6429

C. C. GOLDSMITH, Sekretario.

ESPERANTISTA FERIO EN NORVEGUJO

Pasigu vian somerferion en Lofthus, Hardanger, la plej bela regiono de okcidenta Norvegujo. Dum la pasintaj 3 someroj 150 gesamideanoj el deko da landoj ĝuis tie neforgeseblajn tagojn. Venu vi ĉi-tiun someron!

Tuta kosto 125 norvegajn kronojn, ekskursoj 25 kronojn aldone. Frue anoncu vin. Oni povos akcepti nur 50 gepartoprenontojn. Skribu al

Esperantista Ferio, poŝtkesto 132,
Haugesund, Norvegujo

LA INTERNACIAJ FERIAJ E-KURSOJ

en Helsingør, Danlando

okazos 17-24 Julio, sub aŭspicio de UEA.

La kurskomitato invitas ankaŭ vin.

Pasintjare partoprenis 300 el 11 landoj.

Petu senpagan prospekton ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando

LERNU ESPERANTON

de Daniel Quarello

Katedro de supera kulturo pri Esperanto.

1. Lerne Esperanton.
2. Komplementoj de l'substantivo.
3. Komplementoj de l'verbo.

Afrankite: po 1ŝ. 4p. ĉiu volumeto.

Mendu ĉe U.E.A.

AKCIA KOMPANIO

“VADI”

Komerco pogranda de viandaĵoj
kaj konservaĵoj

Adreso:

Poortstraat 58 bis, Utrecht, Nederlando

SOMERA UNIVERSITATO

(Malmö 1948)

ENHAVO

Enkonduko	-	-	-	-	-	Rektoro Karl Söderberg, Svedujo
La laponoj kiel kultura popolo	-	-	-	-	-	Profesoro B. Collinder
La kimraj artofestoj	-	-	-	-	-	R. Rossetti
El la mirinda naturo	-	-	-	-	-	C. Støp-Bowitz
Astronomiaj sensacioj	-	-	-	-	-	Profesoro K. Lundmark
Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro	-	-	-	-	-	Profesoro D-ro Ivo Lapenna
El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj	-	-	-	-	-	D-ro P. Neergaard
La kalevala kulturo	-	-	-	-	-	Vilho Setälä
Pri la sveda koopera movado	-	-	-	-	-	Rektoro S. A. Stahre
Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro	-	-	-	-	-	D-ro F. Szilagyi

La libro enhavas la tekstojn de la prelegoj en Malmö

Prezo 4 ŝil. Afranko 2p.
(17 respondkuponoj)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LIBROJ EL JAPANUJO

NUN HAVEBLAJ

	ŝ.	d.
Danco de Skeletoj. Ujaku Akita (K. Susuki). Tri teatraĵetoj .. 74 paĝoj, broŝ.	1	9
Enciklopedieto de kulturaj vortoj de Esperanto. Prof. Kawasaki-Naokazu.		
	Vol. 1, 100 paĝoj, broŝ.	3 0
	Vol. 2, 158 paĝoj, broŝ.	5 0
Notu, ke en la Enciklopedieto ĉiuj difinoj estas en la Japana lingvo.		
Granda Lernado kaj Doktrino de Mezeco	102 paĝoj, broŝ.	2 0
La unuaj libroj de Konfuciana Biblio, tradukitaj de Kiuiĉi Nohara.		
Legolibro de Esperantaj Fabeloj	44 paĝoj, broŝ.	1 3
Kompilis Joŝiŝi Simomura ; Reviziis K. Kalocsay.		
Leteroj el mia muelejo. Alphonse Daudet (Mijake-Ŝihej) ..	80 paĝoj, broŝ.	2 6
La Libro-konstantaĵo de Fila Pieco	44 paĝoj, broŝ.	1 3
Esenco de la praktika etiko de Konfuciismo. Tradukita de Kiuiĉi Nohara el Ĉinlingva originalo.		
Medicina Krestomatio , kompilita de Prof. D-ro Hideo Jagi ..	80 paĝoj, broŝ.	2 6
La Sukhavativjuho (Budha sankta skribo).	24 paĝoj, broŝ.	1 3
Tradukita de Kiuiĉi Nohara el la sanskrita originalo.		
Verda Parnaso. I.U. Originalaj kaj tradukitaj poemoj	128 paĝoj, broŝ.	3 0
Verkoj de D-ro Nakamura. (Sciencaj artikoloj, paroladoj, kaj rakontoj).	108 paĝoj, broŝ.	3 0
Zinnoo Sjootoo Ki. Tradukis K. Nohara	208 paĝoj, bind.	3 6
La historio de la Japana imperiestra trono.		

Aldonu 10% por afranko

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo